

Pri: invito al kunlaboro por baza terminaro pri konstrua varmtĥniko

Rotterdam/Brno, 2010-4-22

Estimata samideano,

Ankaŭ vi certe konscias, ke en Esperanto mankas multaj fakaj vortoj. Tiu manko malhelpas bonan fakan komunikadon en Esperanto. Ni ŝatas plenumi iom de la vakaĵoj, kaj invitas al vi konsideri la kunlaboron en ĉi tiu plenumado (kadre de tre limigita kaj konkreta projekto).

Ni elektis la temon varmo. Ĉar ni estas konstruistoj, kiuj forte interesiĝas pri fizikaj aspektoj pri domoj kaj similaj konstruaĵoj, ni traktas nociojn kaj terminojn pri (konstrua) varmtĥniko: ili rilatas al varmizolado de domoj, kalkulado de energikonsumo, energiŝparado k.t.p. Malgraŭ la nuntempa graveco de la temo ankoraŭ mankas en Esperanto diversaj priaj terminoj, eĉ bazaj.

Feliĉe, ni ne plu devas elpensi, kiuj estas la bazaj nocioj, ĉar antaŭ multaj jaroj la Internacia Normiga Organizaĵo publikigis normon ISO 7345, kun la angla titolo «Thermal insulation -- Physical quantities and definitions». En la normo aperas listo de la nocioj kun difinoj kaj simboloj. En la angla versio ankaŭ aperas anglaj terminoj. En multaj landoj oni tradukis la normon, kaj tiel normigis la nacilingvajn terminojn. Ni mem havas proponojn por la esperantaj terminoj. Ilin vi povas trovi per la informoj en la aldonaĵo al ĉi tiu letero.

Varmtĥniko (konstrua) ja estas fako inter fakoj, nome almenaŭ inter fiziko kaj arĥitekturo. Esperanto ja estas internacia lingvo. Pro ambaŭ motivoj ni bezonos internacian kaj interfakan kolektivon, en kiu la nocioj kaj proponitaj esperantaj terminoj estas pridiskutataj, kaj fine, en kiu la ĝustaj esperantaj terminoj estos prikonsentitaj.

Vin ni kontaktas pro via apero en la Jarlibro de UEA aŭ pro tio, ke ni pli-malpli konas vin. Ŝajnas al ni ke via faka aŭ scienca sperto povas esti utila. (*)

Ni do invitas vin al la kolektivo. En la aldonaĵo vi trovos pliajn informojn. Bonvolu respondi al ni, ĉu vi jes aŭ ne kunlaboros. Ni informos vin pri tio, kiuj jesas al la kunlaboro.

Esperante je via reago, salutas sincere,

Fabien van Mook, Nederlando (...@...)
Jan Werner, Ĉeĥio (...@...)

Noto *) Se vi konas esperantistojn, kiuj laboras pri (konstrua) varmtĥniko, aŭ kiu spertas pri ties teorioj, bonvolu informi nin. Ili povas esti konstruistoj, fizikistoj, meĥanikistoj, instalistoj, klimatizistoj, k.s.

Aldonaĵo

Ĉapitro 1. Perspektivo de la jam preparitaj tekstoj

Fabien van Mook publikigis la artikolon «Terminoj pri varmotransiĝo el ISO 7345» en la «Jarkolekto 2009 de TAKE». (Ĉiun jaron ekde 2005 la Tutmonda Asocio de Esperantistoj-Konstruistoj eldonas kajeron kun fakaj kaj teĥnikaj artikoloj. La enhavtabelojn de la kajeroj vi povas vidi je la retpaĝo <http://take.esperanto.free.fr/unikodo/take.htm>.)

Ni invitas vin tralegi la artikolon de Fabien. Por ne troa ŝarĝo de ĉi tiu letero ni ne aldonis la artikolon, sed disponigis ĝin en la retejo <http://fabien.galerio.org/varmo/vanmook2009.pdf>

En la paragrafo 7 de la artikolo aperas la difinoj el ISO 7345, tradukitaj en Esperanton. La tuto de la difinoj konsistigas la tutan nociaron de ISO 7345. En la paragrafo 7 esperantaj terminoj krome estas proponataj. En la paragrafo 9 la deziro estas esprimita, trakti la proponaĵojn en internacia kolektivo de fakuloj. Por la kompreno de la nociaro kaj de la proponitaj terminoj, Fabien prezentas kuntekston en la paragrafoj 1 ĝis 6, kaj klarigon pri la proponitaj esperantaj terminoj en la paragrafo 8.

Jan Werner, kun la konsulto de Fabien, kompilis la tekston «Teoria bazo de varmoprosesoj en domkonstruktoj - La bazaj nocioj kaj grandoj uzataj en konstrua varmtĥniko». Ĝi estas ŝutebla de la retejo <http://fabien.galerio.org/varmo/werner2010.pdf>.

En la teksto Jan listigis la nociojn, kiuj ankaŭ aperas en ISO 7345, kaj kromajn nociojn --- nome, pli bazajn (ekzemple temperaturo). Per la teksto li prezentis la temon en iu alia maniero kaj per iom alie formulitaj priskriboj kaj difinoj. Ni esperas, ke la alia formo helpas al vi la komprenon de la nocioj kaj terminoj. Krome, la teksto mencias eventualajn alternativojn por la esperantaj terminoj.

Ĉapitro 2. La dezirata labormetodo

2a.

Ni volas labori laŭ la internaciaj metodoj terminologiaj. En la esperanta literaturo vi povas legi pri tio en, ekzemple «Terminologia gvidilo» de H. Suonuuti (Rotterdam: UEA, 1998), «Terminologia konsideroj» de Jan Werner (Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004), kaj «Terminologia kurso» de Jan Werner (Roudnice n.L., 1986). Ili estas aĉeteblaj ĉe UEA.

Ni povas koncize listigi la paŝojn de la metodo jene:

- (a) elekto kaj limigo de la temo,
- (b) kolekto de la nocioj, difinoj kaj terminoj el fontoj,
- (c) ordigo kaj strukturigo de la nociaro/nocisistemo,
- (ĉ) elekto kaj formulado de terminoj kaj difinoj, kaj
- (d) publikigo.

Homoj ofte pensas ke la terminologia laboro konsistas precipe el kolekto, elekto kaj, se necesas, elpenso de terminoj. Sed ili forgesas la gravegajn paŝojn a kaj c. La temo devas esti sufiĉe limigita, ĉar alie oni riskas pretervidi nociojn kaj ĉar oni ne povas superrigardi ĉiujn

nociojn ene de la temo. Gravega laboro ankaŭ estas la ordigo kaj strukturigo de nocioj, ĉar per la strukturo oni povas pli bone superrigardi kaj sekve pli bone elekti terminojn. En la publikigo la strukturo estu klare videbla -- alfabeto listigo de la terminoj ne sufiĉas, por ke la listo nomiĝu «terminaro».

Kondiĉo de bona terminologia laboro estas la internacieco de la grupo de la kunlaborantoj. En internacia lingvo kiel Esperanto tio eĉ des pli gravas. Se la grupo de la kunlaborantoj ne estas sufiĉe internacia, oni riskas prezenti nociaron kaj terminaron sen sufiĉa ĝeneraleco. Tiel nocioj aŭ terminoj estas tro specifaj aŭ limigitaj al certaj kulturoj aŭ landoj. Alia grava kondiĉo estas kompreneble, ke la kunlaborantoj spertas pri la temo.

2b.

Ni elektis ĝuste ISO 7345, ĉar ĝi estas konkreta nociaro, sufiĉe malgranda. Krome, la nociaro kaj la difinoj estiĝis jam en internacia rondo, nome iu internacia laborgrupo de la Internacia Normiga Organizaĵo. Tial ni atendas, ke la kolektivo povos relative rapide progresi, ĉar la gravaj komencaj paŝoj de la terminologia laboro estas jam farita en internacia kunteksto.

En la preparitaj tekstoj ni (Fabien kaj Jan) sekvis la internacie strukturigitajn nociojn. La kolektivo precipe traktu tiujn tekstojn. Por fari tion bone, la kolektivo devos paŝi jene:

- (1) ĉiu kolektivano provos kompreni la nociojn, kiuj estas prezentitaj en la preparitaj tekstoj. Ne ĉiu ano ja povas koni ĉiujn nociojn, ĉar multaj nocioj specifikas al la konstruista fako;
- (2) la kolektivo interkonsentos pri la amplekso kaj strukturo de la nociaro;
- (3) la kolektivo interkonsentos pri la ĝustaj esperantaj terminoj;
- (4) la kolektivo publikigas la terminaron.

Ni ripetas, ke la taskoj de la kolektivo rilatas nur al la nocioj de ISO 7345. Ili estas plej rekte prezentitaj en la paragrafo 7 de la artikolo de Fabien el 2009.

2c.

Ni volas labori per retmesaĝaj cirkuleroj, redaktataj kaj dissendataj de Jan aŭ Fabien. Ni jam aplikis la metodon de cirkuleroj en pluraj okazoj (vidu malsupre ĉapitron 4), kaj spertis, ke ĝi estas efika kaj klara.

Ĉi tiu letero estas fakte la unua cirkulero. Vian respondon, per kiu vi reagis almenaŭ al la starigitaj demandoj, vi povas sendi al Fabien. Post certa tempo ni kompilos la respondojn kune kun niaj opinioj, kaj dissendos novan cirkuleron.

Ĉiuj cirkuleroj aperos ankaŭ en la retejo <http://fabien.galerio.org/varmo/>. En reteja versio de cirkulero estos forigitaj retpoŝtadresoj, por la malebligo de spamo.

Ĉapitro 3. Unua tasko

Se vi jesas al la kunlaboro, ni afable petas al vi plenumi la jenajn (unuajn) taskojn:

- (a) kompreni la labormetodon (ĉapitro 2),
- (b) legi la artikolon de Fabien el 2009 kaj la tekston de Jan (vidu la retligojn en la ĉapitro 1), kaj
- (c) respondi la jenajn demandojn:

(c1) Ĉu la nocioj en ISO 7345 klaras al vi? ISO 7345 celas difini nociojn pri varmotransiĝo

tra muroj, vandoj, tektoj (inkl. de plankoj kaj plafonoj) kaj tegmentoj en konstruaĵoj. Do oni aplikas fizikajn sciojn pri varmo en specifa kunteksto, en kiu konstruistoj k.s. havas specifajn nociojn. Ni imagas ke al fizikisto, kiu ne laboras pri konstruaĵoj, ne nepre klaras la celon aŭ utilecon de iuj specifaj nocioj.

(c2) Ĉu mankas gravaj bazaj nocioj en ISO 7345? Ĉu iuj nocioj en ISO 7345 estu preterlasataj aŭ alimaniere difinataj?

Per la du demandoj c1 kaj c2 ni serĉas interkonsenton pri la amplekso de la nociaro, la nociaro mem kaj la difinoj de la nocioj. Tiun interkonsenton la kolektivo devos unue akiri, antaŭ ol la kolektivo povos progresi al elekto de ĝustaj esperantaj terminoj. Bonvolu respondi **antaŭ la 15a de junio 2010**. Ni planas dissendi la duan cirkuleron ĉirkaŭ la 20a de junio.

Ni konscias, ke la supre menciita takso iom ampleksas. Bonvolu fari laŭ via povo, kaj bonvolu raporti pri via progreso **antaŭ la 15a de junio**. Per la dua cirkulero ni ankaŭ celas informi vin pri la sinanoncoj. Ĉi tio ja povas instigi vin, aliajn kaj nin eke aŭ plue kunlabori en la kolektivo.

Ĉapitro 4. Konstru-Forumo

La nova projekto pri varmtĥnikaj terminoj, al kiu ni invitas vin, ne estas sola, senliga projekto. Fakte, ĝi ne nur estiĝis pro artikolo de Fabien por la «Jarkolekto 2009 de TAKE» (vidu supre ĉapitron 1), sed ĝi ankaŭ estas diskuttemo de la Konstru-Forumo.

La Konstru-Forumo estas kolektivo, kiu ne dependas de iu oficiala organizaĵo, kaj en kiu oni konkrete diskutas kaj konsultiĝas pri terminaj vakaĵoj en la konstruista faklingvo. Jan Werner lanĉis la forumon en januaro 2005. Nun partoprenas ĉirkaŭ dekdu fakuloj. Ĝia retpaĝo estas <http://purl.org/net/kofo/>; tie aperas ties cirkuleroj.

La Konstru-Forumo fondiĝis post la publikigo de la «Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj» (Brno: Eldono de Jan Werner, 2002). Ĉi tiu kvarlingva terminaro estis verkita de kolektivo el 5 konstruistoj laŭ la terminologiaj principoj. La kunlaboro tiom plaĉis al la kolektivanoj, ke multaj el ili decidis permanente kunlabori en la Konstru-Forumo kaj aŭtori por la «Jarkolekto de TAKE». Okaze de la kvarjariĝo de la Konstru-Forumo Jan Werner prelegis en KAEST 2008. La prelego troveblas je <http://fabien.galerio.org/varmo/werner2008.pdf>.

Vi povas nun imagi, ke la nova projekto pri varmtĥnikaj terminoj ne estiĝis el hazardo nek en sensperta teamo.

Krome, ni notas, ke bona plurlingva terminaro verkita de esperantistoj povas uziĝi ankaŭ ekster Esperantujo. Tio eĉ okazas kun la terminaro pri betono, pro la decido de la inĝenieraj ĉambroj de Hungario, Slovakio kaj Pollando apliki ĝin kaj aldoni siajn lingvojn (kiel estas menciita en en la prelego de Jan). Eble io simila iam okazos kun la estonta terminaro pri varmtĥnikaj terminoj!